---

# Pikemaj puloj

(ekzerca teksto por eldirado de sonoj b kaj p,
por lernantoj kies ĉiutaga lingvo ne entenas la sonon p (araba …)

Malsato ja elporteblas,
sed ne por longa tempo.
Pulo-paro post tehora babilo
postulis sangon.
En la ĉambro sub la piano
sidas pupo, blu-okula bebo
kun bela jupo kaj blondaj bukloj,
jen konvena predo.
Pupo-gambon ili blind-pike palpas, sed ve!
Malmola kiel pilko,
la pala plastaĵo ne plaĉas,
kaj jen pruvo: la pinton de la pikilo
ili tordas dum la provo.



Pretas plu peni kaj klopodi nek li, nek ŝi:
Kun bedaŭro la pularon ni avertu,
ke la butiko ne plenas je plezuroj.
«Ni supren rampu, ili diras,
por trovi laŭapetitan beston
prefereble kun du gamboj po unu.»

Dumtempe paĉjo portas
polvosuĉilon al la planko.
Gepuloj paŭtas:
«Kia respekto-manko,
peli nin al la rubo!
Kiun planon ni apliku ?
Ni bezonas biciklon por eskapi
For de la rampanta boao.»
Sed biciklon ili ne posedas,
kia paniko!



Papilio pasante proponas
Ilin porti al pinio
Kie gastojn akceptas upupo.
Bileton la portanto ne postulas.
«La ripojn ni ne rompu en la ŝtuparo:
Tuj al la papilio.»

Kaj nun pinte de la pinio,
Upupo al la insektoj gapas:
«Kiun manĝos mi unue?
ĉu la pulojn, ĉu la raŭpon?
Raŭpo kun flugiloj,
plendas la buntulo,
Por upupidoj ne bongustas.»



«Nek brave nek prave,
Rebatas la upupo:
Papilion kaj puloparon
Mi kun apetito povas gluti.
Ne plendu ke la beko kun bruo
Nun pikos: ja la paro malaperu
Kaj tuj poste la helpemulo.»



Sed tuj el pinio
Papilio ekflugas
Kaj puloj eksaltas:
Pli valoras tranokti
Eksterneste sub nuboj kaj pluvo
Ol servi kiel bombono
En upupo-menuo.